# Disvastigo de Esperanto per enhavo-kreado en amuzado-platformoj

Pablo Busto

## Enkonduko

En la nuna mondo, pli kaj pli kunligita per ciferecaj retoj, la revo pri tutmonda helpa lingvo Esperanto estas pli atingebla ol iam ajn. Kvankam la legantoj de tiu ĉi artikolo jam bone scias pri kialoj por disvastigi Esperanton restas la demando: kiel ni povas plej efike antaŭenigi la uzadon de nia lingvo?

Kompreneble, modernaj teĥnologioj kiel la interreto ofertas nekredeblajn eblojn por konekti kaj inspiri homojn tra la tuta mondo. Evidente, unu promesplena vojo al tiu celo estas interreta amuzado: Rimedo, kiu kombinas atingeblon kun granda allogo.

En ĉi tiu artikolo estas diskutata, kiel kreado kaj subtenado de bonkvalita enhavo en Esperanto por retaj platformoj povas roli efike en la disvastigo de la lingvo en la nuntempa mondo. Plie, kiel unu ekzemplo de penoj al tiu aspiro, nia projekto estas prezentata.

## Enreta Amuzado

Interreta amuzado estas grava parto de la moderna kultura vivo, inkluzivante filmetojn, elsendfluajn servojn, interagajn ludojn, kaj sociajn retojn. Krom sia distra celo, interreta amuzado ofte ankaŭ edukas, per subtile enkonduki spektantojn al novaj ideoj, kulturoj, kaj eĉ lingvoj.

Esperanto jam longe havas ĉeeston en la reta mondo, kun projektoj kiel blogoj, podkastoj, kaj YouTube-kanaloj, unu el la plej famaj de kiuj estas *Evildea*, sed ankaŭ *Cristina Casella*, *La Malfamuloj*, *Jonny M*, ktp. Kelkaj tiaj projektoj starigis la bazon por kreskanta komunumo de esperantistoj en la reto. Tamen, por plene utiligi la povon de interreta amuzado kiel ilon por lingva antaŭenigo, necesas koncentriĝi pri kreado de altkvalita, alloga enhavo, kies manko facile sentiĝas hodiaŭe, kaj ankaŭ, grave menciinde, pri videbligado de la kreita enhavo.

Ideale, tia enhavo kaptus la imagon de tutmonda publiko, inkluzive, kaj pli grave, tio de tiuj ekster Esperantujo. Bona enhavo en Esperanto povus ankaŭ krei pontojn inter scivolemo kaj amuziĝo. Ekzemple, interesa reta serio aŭ furora esperanta temo en socia reto povus inspiri spektantojn ekscii pli pri la lingvo, dum subtitoloj aŭ sinkronigitaj enhavoj povus logi internacian publikon. Kreskigi kreemon kaj kuraĝigi enhavokreantojn povas igi Esperanton videbla kaj vivoplena parto de la reta kulturo.

## Enhavo-kreado

Enrete-disponebla enhavo multe evoluis kun la apero de Reto 2.0, kiu transformis pasivajn konsumantojn en aktivajn partoprenantojn. Platformoj kiel *YouTube*, *TikTok*, kaj *Twitch* “demokratiigis” kreadon kaj publikigon de enhavo, ebligante al ĉiu kun poŝtelefono dividi siajn ideojn kun la mondo. Tiu ŝanĝo malfermis pordojn por lingvoj kiel Esperanto akiri pli

grandan videblecon per uzul-kreita enhavo.

Tamen, la kvalito kaj kvanto de Esperanta enhavo varias. Kvankam ekzistas sindonemaj volontuloj, la komunumo mankas je forta bazo de profesiaj kaj duon-profesiaj kreantoj, kiuj povas konstante produkti bone kreitan kaj efikan enhavon. Plej multaj ekzistantaj materialoj estas kreitaj el amo al la lingvo, kio, kvankam admirinda, ofte malfacile konkuras kun alilingvaj kreaĵoj.

Por solvi tion, estas grave kuraĝigi esperantistojn investi en la kreado de enhavo, kiu atingas profesiajn normojn. Eblas tion realigi per atelieroj, kunlaboroj kun spertaj kreantoj, aŭ eĉ financado de ambiciaj projektoj. Plue, krei komunumon kaj rekonon—kiel premioj, konkursoj, aŭ prezentado de elstaraj verkoj—povus motivigi kreantojn strebi al boneco.

# Videbleco kaj Reklamado de Enhavo

Krei bonkvalitan enhavon estas nur duono de la laboro; certigi, ke ĝi atingos la ĝustan publikon, estas same grava. En ĉefaj platformoj, enhavo en pli malgrandaj lingvoj kiel Esperanto ofte malaperas en la maro de enhavo en pli uzataj lingvoj. Tiu manko de videbleco ne nur limigas la eblan spektantaron, sed ankaŭ povas senkuraĝigi kreintojn, kiuj sentas, ke iliaj penoj restas nevidataj.

Tiu defio montras la gravecon de videbleco. Por ke Esperanta enhavo sukcesu, necesas planitaj strategioj, kiuj antaŭenigas ĝian troveblecon kaj allogas la spektantaron. La algoritmoj de ĉefaj retejoj ofte favoras enhavon en vaste uzataj lingvoj, kio malfaciligas, ke Esperantaj materialoj ekhavu naturan atenton. Sekve, eĉ elstaraj enhavoj povas resti neaprezitaj sen intenca kaj zorgema disvastigo.

La solvo troviĝas en evoluigo de specialaj retejoj kaj iloj, kiuj kunigas Esperantan enhavon kaj faciligas ĝian trovadon por la komunumo. Ĉi tie, projektoj kiel *Aperu!* povas ludi grandan rolon, ofertante centran lokon por videoj, blogoj, podkastoj kaj aliaj rimedoj. Per kolektado kaj reklamo de Esperanta enhavo, tiaj iniciatoj helpas kreintojn trovi sian publikon kaj kuraĝigas spektemulojn pli profunde esplori la lingvon.

Krome, gravas disvastigi Esperantan enhavon ankaŭ tra aliaj kanaloj. Diskonigo en sociaj retoj, kunlaboro kun influantoj, kaj kontaktado de plurlingvaj spektantaroj povas multe pligrandigi videblecon. Tiuj klopodoj ne nur ligas kreintojn kun ilia rektaj celgrupoj, sed ankaŭ prezentas Esperanton al pli vasta publiko, vekante scivolemon kaj intereson.

Por daŭre vivteni viglan mondon de Esperanta enhavo, ni devas prioritati kaj kreadon kaj videblecon. Subtenante kreintojn kaj disvastigante ilian laboron, ni certigas, ke la voĉo de Esperanto sonas klare kaj forte en la tutmonda interreto.

# La Reto *Aperu!*: Ekzemplo de Peno

## Kio ĝi estas, kion ĝi celas esti

La reto *Aperu!* celas fariĝi ampleksa ilaro, kiu aktive kaj aŭtomate serĉos kaj kolektos ĉiuspecan enhavon en Esperanto aŭ pri Esperanto – inkluzive filmetojn, blogerojn, podkasterojn ktp. – tra la tuta interreto, kaj montros ĉiujn trovaĵojn en moderna kaj alloga esperanta etoso. La ĉefa trajto de *Aperu!* estas ĝia sistemo por aŭtomate kolekti kaj organizi freŝan enhavon, kaj tiel Aperu.net estos centra retejo, kie oni facile trovos riĉan gamon da konstante ĝisnunigatan esperantaj enhavoj.

Ĝis la nuna momento, el la granda vizio de *Aperu!*, la sola funkcianta subprojekto estas

*Tubaro*, disponebla ĉe tubaro.aperu.net. *Tubaro* fokusas pri kolektado kaj prezentado de videaĵoj, kaj momente nur pri tiuj de YouTube, konsiderante la popularecon de tiu platformo kompare al la aliaj. *Tubaro* ofertas modernan kaj uzant-amikan sperton kun interfaco speciale kreitan kaj tajloritan por esperantistoj.

## Kiel la Projekto Povas Helpi Esperanton

La reto *Aperu!* celas trakti kernajn defiojn, pri kiuj ni diskutis antaŭe: kuraĝigi kreadon de bona enhavo, plibonigi videblecon, kaj subteni viglan Esperanto-komunumon. La ideo ekestis el la deziro rompi la "malvirtajn cirklojn" kiuj limigas la kreskon de esperanta enhavo de ambaŭ kvanta kaj kvalita vidpunktoj. Jen kiel ni provas alpaŝi tiujn flankojn:

**Rompi la kvantan barilon:** Ofta problemo de esperanta enhavo estas manko de spektantaro. Kun malpli da spektantoj, enhavokreantoj ofte sentas, ke ilia laboro ne estas taksata, kaj tio senkuraĝigas ilin krei plu. *Tubaro* celas rekte alfronti tiun problemon per kunigado de enhavo en unu loko, certigante, ke eĉ niĉaj aŭ malpli konataj filmetoj trovas sian publikon.

**Plibonigi kvaliton per videbligado:** Alia defio estas, evidente, la kvalito de esperanta enhavo. Sen sufiĉaj spektantoj, multaj kreantoj – ofte amatoroj aŭ volontuloj – ne sentas la motivon daŭre investi tempon kaj penon por plibonigi aŭ foje eĉ daŭrigi sian verkon. Per reklamo de tiuj kreantoj kaj konekto kun pli granda spektantaro, *Tubaro* celas krei medion, kie altkvalita enhavo estas kaj aprezata kaj instigata.

Alivorte, per konstanta skanado de novaj filmoj, *Tubaro* certigas, ke ekzistanta enhavo ne restu nekonata, kaj kuraĝigas kreintojn enfokusigi sian tempon al produktado, anstataŭ memreklamado. Tiel, *Tubaro* plifaciligas trovi esperantajn videaĵojn, kiuj estus malfacile troveblaj alie. Evidente, tio havas kelkajn rektajn avantaĝojn:

- **Al spektantoj:** *Tubaro* plibonigas la sperton serĉi esperantan enhavon. Kutima vizito al *Tubaro* ŝanĝas la perspektivon el "*Ĉu mi trovos iun novaĵon?*" al "*Kiujn novajn filmetojn mi trovos hodiaŭ?*" Tia konstanta kontakto kultivas kutimon konsumi esperantan enhavon kaj firmigas la lingvon en ilia ĉiutaga vivo.
- **Al kreantoj:** *Tubaro* malkreskigas la penon pri reklamado de filmetoj tra diversaj platformoj kiel Telegram, Discord, WhatsApp, MiaVivo.net, ktp. Per aŭtomata disvastigo kaj sen bezono ensaluti aŭ registriĝi, *Tubaro* permesas al kreantoj fokusigi siajn fortojn je tio, kion ili plej bone faras: krei enhavon.
- **Al Esperanto:** *Tubaro* helpas refuti la mitojn, ke "neniu parolas Esperanton" kaj "ne ekzistas enhavo en Esperanto." Ĉu esperantisto, ĉu hazarda neesperantisto kiu eniras Tubaron malkovros grandan katalogon kun pli ol 400 kanaloj kaj pli ol 50,000 filmetoj, kiuj atestas al la vivanteco de la esperanta mondo. Plue, ĉiuj filmetoj rekomenditaj de *Tubaro* aŭ rilatas al aŭ estas en Esperanto, kio pli forte prezentas la kulturan gravecon de Esperanto en tiu ĉi platformo.

Krome, *Aperu!* celas pli ol nur kunigi enhavon. Per kreado de centra loko por esperantaj materialoj, ĝi starigas bazon por vigla ekosistemo, kie kreantoj kaj konsumantoj reciproke subtenas unu la alian. Estontaj planoj inkluzivas vastigon al blogoj, podkastoj, kaj aliaj formatoj, por havigi efikan rimedon al ĉiuj, kiuj volas malkovri esperantan kulturon kaj medion.

Tiu ĉi peno ne nur fortigas la ekzistantan esperantan komunumon, sed ankaŭ povas agi kiel pordego por novuloj. Ĉu scivolema ne-esperantisto trafas allogan filmeton aŭ sperta parolanto trovas novan inspiron, *Aperu!* celas fari esperantan enhavon videbla, disponebla kaj alloga.

## Komparo kun similaj klopodoj

Kvankam *Aperu!* ne estas la unua projekto kiu celas kunigi esperantan enhavon, estas kelkaj novigadoj ĉe ĝi, kiuj distingas ĝin de antaŭaj iniciatoj:

- *Aperu!* ne postulas enhavokreantojn ŝanĝi siajn platformojn. Projektoj kiel *Farbskatol'* aŭ *Internacia Televido* celis kunligi esperantajn videaĵojn per koncentrigi la kreantojn. Kompare, *Aperu!* permesas al kreantoj resti ĉe siaj preferataj platformoj. Tiel ili povas labori en konataj medioj, samtempe profitante pli vastan videblecon en Esperantujo.
- *Aperu!* ne devigas kreantojn aktive diskonigi siajn kreaĵojn. Kompare, ekzemploj de tia solvo estas *Klaku! kaj Eventaservo*. Male, *Aperu!* uzas pasivan sed potencan manieron por malkovri kaj diskonigi enhavon sen ke kreintoj faru tion mem. Tiel ili povas pli libere koncentriĝi pri kreado, sen ajna prizorgo pri la resto, ĉar la aŭtomataĵoj de *Aperu!* diskonigos ĉion.

Kiel sub-projekto de *Aperu!*, *Tubaro* permesas kreantojn uzi *YouTube* (kiu estas jam bonega teĥnika solvo), kaj ne devigas ilin aktive diskonigi siajn kreaĵojn. Kontraŭe, ĝia celo estas pligrandigi la spektantaron de jam-kreita enhavo, per konstanta kaj aŭtomata kolektado de novaj filmoj.

# Ĉi tiu Konkurso

Ni sincere dankas la organizantojn de la konkurso pro starigo de iniciato, kiu elstarigas novigajn ideojn por antaŭenigi Esperanton. Tiaj iniciatoj estas ne nur gravegaj por instigi kreemon en la komunumo, sed ankaŭ tre valoraj por doni videblecon al projektoj, kiuj alikaze povus resti nekonataj.

Per kuraĝigo al partoprenantoj por kritike pensi kaj proponi solvojn, la konkurso fortigas la klopodojn disvastigi Esperanton kaj metas en lumon malsamajn alirojn. Ĝi instigas kunlaboradon, inspiras freŝajn ideojn, kaj emfazas la potencialon de Esperanto kiel vivanta kaj vigla lingvo en la hodiaŭa interkonektita mondo.

Krome, konkursoj kiel tiu ĉi havas gravan rolon en plifortigo de la videbleco de iniciatoj kiel *Aperu!*. Ili donas al partoprenantoj ŝancon prezenti siajn projektojn, ricevi valorajn reagojn, kaj konekti kun pli vasta publiko. Tiel, ili kontribuas al la plifortigo de la Esperanta komunumo.

## Niaj Aspiroj kaj la Rolo de la Premio

Ni ĝojas partopreni ĉi tiun konkurson kaj esperas gajni premion. Tiuokaze, la premio estos uzata por plirapidigi la evoluigon de *Aperu!*. Jen kiel ni planas utiligi ĝin por plibonigi nian projekton kaj tiel helpi pliampleksigi Esperanton.

### Daŭripovo de la Projekto

Parto de la premio estos uzata por certigi la daŭran funkciadon de la reto de *Aperu!*, kovrante esencajn kostojn kiel retgastigadon. Nuntempe ĉi tiuj kostoj estas ĉirkaŭ 100 eŭroj jare, sed ili kreskos laŭ la pliiĝo de funkcioj kaj uzantoj de la retejo. Ajna financa subteno helpos al ni seninterrompe prizorgi kaj plivastigi la projekton.

### Pliigo de Funkcioj kaj Platforma Subteno

Alia parto de la premio liberigos la disvolvigantojn por evoluigi la retejon por novaj ecoj, kaj por novaj platformoj. Inter la dezirataj planeroj ni povas listigi:

- **Disvolvigo de Tubaro:** Nun *Tubaro* fokusiĝas pri *YouTube*-videoj, sed ni planas subteni pliajn platformojn kiel *Vimeo*, *PeerTube*, Odysee, kaj *D.Tube*. Tio donos al

kreantoj liberecon elekti sian preferatan videoplatformon, certigante ke ilia enhavo restos atingebla al Esperanto-spektantoj.

- **Lanĉo de Novaj Subprojektoj:** Ni celas krei similajn ilojn al *Tubaro* por aliaj specoj de enhavo, kiel podkastoj, revuoj, blogoj, kaj eble pli. Tiuj subprojektoj kune formos ampleksan sistemon por Esperanto-komunikiloj.
- **Aŭtomata Dividado de Enhavo:** Ni planas aldoni eblon aŭtomate plusendi enhavon al popularaj sociaj platformoj kiel *WhatsApp*, *Telegram*, *Discord*, *Mastodon*, *X* (antaŭe *Twitter*) ktp. Ĉi tiu trajto plivastigos la atingon de Esperanto-enhavo, farante ĝin pli facile trovebla kaj dividenda.

## Subteno al Kreantoj per Instigoj

Cetera parto de la premio, kaj la plej grava, estos dediĉita al rekompencado de kreantoj kies afiŝoj gajnos la plej grandan popularecon en *Tubaro*. Ĉi tiu iniciato celas plurajn aferojn:

- **Instigi Partoprenon:** Antaŭvideble, la rekompencoj povas pli instigi la kreantojn dividi sian enhavon pere de *Tubaro*, anstataŭ nur tra la ĉefa platformo, kiel YouTube. Tio ne nur plivastigos la popularecon de *Tubaro* kaj *Aperu!*, sed ankaŭ fortigos vivantan ekosistemon de Esperanto-enhavo.
- **Plialtigi la Kvaliton de Enhavo:** Financaj instigoj povas altiri duonprofesiajn kreantojn, kiuj alie ne interesiĝus pri Esperanto. Kunlabore kun Esperantistoj aŭ kreante rekte en Esperanto, ĉi tiuj kreantoj povos fari pli altkvalitan enhavon, kaj tiel helpi rompi la malbonan ciklon de malalta kvalito → malmultaj spektantoj → malalta kvalito.
- **Kuraĝigi Sanan Konkuradon:** La konkura aspekto de la enhavaj konkursoj instigas kreantojn novigi kaj strebi al plejboneco. Ekzemploj de provoj pri tiaj konkursoj kun rezultoj jam videblas en nia Telegram-kanalo ĉe [AperuPlejPopularaj].

## Kreskigo de Publika Intereso

La videbleco de ĉi tiu konkurso mem estas ŝanco. Artikoloj kaj diskutoj pri la konkurso nature altiros pli da atento al *Aperu!* kaj ĝiaj subprojektoj. Dum la konscio pri ĝi kreskas, tiel kreskos ankaŭ la nombro de uzantoj, kreante pozitivan ciklon de malkovro, partopreno, kaj kreskado. Per traktado de tiuj ĉi kernaj bezonoj, ni celas krei daŭran efikon, kiu superas niajn tujajn celojn.

# *Pri la teamo de Aperu!*

Kompreneble, granda projekto kiel aperu.net ne estas unusola persona projekto, sed la ĉefa videbla vizaĝo de *Aperu!* estas Pablo Busto.

Lia plej fama kreaĵo estas la kanto *Dek Bovinoj*, sed kunlaboris ankaŭ kun aliaj projektoj, kiel *Muzikumejo* aŭ *Pangea Eldonejo*. Tiuj spertoj konvinkis lin pri la manko, kaj neceso de esperanta ekosistemo, kiu realiĝas nuntempe en aperu.net